

Johann Wolfgang von Goethe,  
La rozeto

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

Knabo vidis – jen rozeto  
Sur la kampo staras;  
Bela, juna la floreto . . .  
Vive kuras la knabeto,  
Ĝojas, miras, flaras.  
Sur la kampo la rozet’  
Kiel infanet’.

Knabo diris : « mi eltiros  
Belulinon mian »;  
Floro diris : « vi foriros, –  
Per pikiloj mi disŝiros  
Tuj la manon vian ».  
Sur la kampo la rozet’  
Kiel infanet’.

La sovaĝa knab’ ridante  
La rozeton prenis, –  
La floreto batalante  
Sin defendis pikadante,  
Sed la sorto venis.  
Sur la kampo la rozet’  
Kiel infanet’.

*Traduko de la Germana poemo “Heidenröslein” de  
JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-  
28 – †1832-03-22) en Esperanton de LUDWIG LA-  
ZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo,  
\*1859-12-15 – †1917-04-14).*

*Arg-1022-2070 (2014-05-23 12:25:14)*

*Tiu ĉi Zamenhofs poemo-traduko troviĝas en  
[http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/  
librejo/0012/0008.php](http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php).*

Johann Wolfgang von Goethe,  
Dornrozeto

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

Vidis knab’: Jen, juna flor’!  
Rozujet’ kampara!  
Bela, kiel la aŭror’!  
Li alkuris ĝoje por  
Vidi, kiel kara!  
Rozo, rozo, ruĝa roz’,  
Rozujet’ kampara.

Diris knab’: Mi volas vin,  
Rozujet’ kampara.  
Diris roz’: Mi boras vin,  
Ĉiam vi memoras min,  
Pro l’ dolor’ amara.  
Rozo, rozo, ruĝa roz’,  
Rozujet’ kampara.

Knabo rozon ŝiris do  
De l’ rozuj’ kampara,  
Ĝi, defende, pikis tro!  
Sed ne helpis ve kaj ho  
Kontraŭ vol’ barbara.  
Rozo, rozo, ruĝa roz’,  
Rozujet’ kampara.

*Traduko de la Germana poemo “Heidenröslein” de  
JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 –  
†1832-03-22) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY  
(Kalmano Kaloĉajo, \*1911 – †1976).*

*Arg-1022-2226 (2014-12-16 16:56:40)*

*Tiu ĉi poemo-esperantigo troviĝas interalie  
en [http://egalite.hu/kalocsay/eterna/  
dornrozeto.htm](http://egalite.hu/kalocsay/eterna/dornrozeto.htm).*